# *Floridita: Hemingway kaj daikirio*




Fakte, la jardeko de la tridekaj jaroj pasintjarcente, unuigis en tiu ?i restoracio-drinkejo kelkajn homojn, inter ili, entrepreneman katalunon kaj obstinan aventuremulon.

Amba? markis startpunkton en la kuba koktelumado: unu estis Constantino Ribalaigua, ser?anto de esencoj allogontaj la gustosenson; la alia, amanto de fortaj emocioj kaj bonaj drinka?oj; la unua plibonigis la daikirion, kaj la alia, verkisto konfirmita kies nomo estis Ernest Hemingway, famigis ?in je tutmonda skalo, kaj renovigis ?in, tial ke faris ?in pli potenca, tio estas Sova?a Daikirio, kiu estas nuntempe fama, sub la nomo Papa Hemigway speciala, kun malpli da sukero kaj pli da rumo.

La konstanta vizito de la usona verkisto kaj la kvalito de la kokteloj igis la restoracion-drinkejon Floridita tre notinda, kaj sekve, ?i estis konsiderata inter la sep plej bonaj drinkejoj de la tuta mondo,  kune kun  Rafles Bar de Singapuro; la hotelo Shelbourne, de Dublino; la klubo 21 de Nov-Jorko; la Ritz Bar, de Londono; la Ritz de Parizo kaj la Pied Piper Bar en la Hotelo Palace de San Francisko.

Kiam Hemingway gajnis la Nobelpremion de literaturo en la jaro 1954, en la drinkejo oni senvualigis buston, kies bronza plako tekstas jene: “Al nia amiko Ernest Hemingway. Nobelpremio de Literaturo. Floridita”. La? oni rankontas, la verkisto multe emocii?is kaj esprimis ke li ne meritis tian honoron.

Sendube,  Floridita markis la vivon de Hemingway. Al tiu loko li portis amikojn kaj vizitantojn, kiel la konataj geaktoroj, Spencer Tracy, Errol Flynn, Marlene Dietrich, Ava Gardner, Robert Taylor, Libertad Lamarque, Pedro Almendáriz kaj certe multaj aliaj.

La verkisto oma?is sian preferatan drinkejon Floridita per sia verko Insuloj en la Golfo, tiel ke en tiu drinkejo okazas parto de la romano kaj multaj personoj, kiuj alvenas tien,  estis realaj konatuloj, kiuj dividis kun li belajn momentojn en la populara drinkejo.

Nuntempe, la fama Floridita estas ?iam plena de vizitantoj, kiuj estante tie, sentas la ?eeston senliman de Hemingway. Tie oni trovas lian preferitan se?on, kiu neniam plu estis uzata. Tie ?iam aperas iu, kiu gustumante bongustan daikirion tostas je la memoro de Ernest Hemingway.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/198196-floridita-hemingway-kaj-daikirio

**Radio Habana Cuba**